



# Norvega Esperantisto

E S P E R A N T O B L A D E T

N-ro 5/6  
1966

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
32-a (37-a) jaro  
Monata

*Julio Baghy:*

## NORDA LETERO

Letero venis de la morna nordo..  
La vortoj en tropika sento ardas:  
«Poet', mi sidas en silent' ĉe fjordo,  
en la spegul' golfeta min rigardas..  
Pri suda kiso, jam en tomb' jardeka,  
memoro trudas sin al sol' intima,  
pri kis' printempa, min por Vivo veka,  
liganta al dorlota sent' anima..

Ci, vagabondo kun sudkora flirto,  
promesis tiam foje min viziti;  
min ravis ritma tril' de l' suda birdo  
kaj mia koro emis tuj — krediti..  
Esperis mi, sed vane, ĉar tra l' mondo  
tajfun' detrua de l' Malam' frenezis,  
en sango dronis plano pri renkonto;  
mem nia amo tiam nur — herezis..

Sunora blondo mia jam griziĝis,  
okuloj kun ĉielo ne vetbluas,  
manetoj blankaj — vejnaj manoj iĝis,  
ne tintas mia rid', nur knare bruas..  
kaj ankaŭ ci, tre kara vagabondo,  
tra l' okulvitroj nun la belon gvas,  
vidante geamantojn en la rondo  
por l' kis' envie certe cin kompatas..

Aĥ, min mi turnas for de l' golfa bildo  
por rejuniĝi nun, jardekojn peli,  
revidi nin en idilia mildo,  
pri dolĉa ŝanco pense refabeli  
kaj vivi, jes, revivi kio estis  
donace de la Viv' al ni donita,  
kion du koroj, ho, triumfe festis  
kun gajo en sindona senhezita..

— — — —  
Poet', pardonu!... Tro mi arlekenis  
por distri cin ĉe lito hospitala...  
Kiam la fam' pri cia stato venis,  
kreiĝis pens' pri tiu «kis' fatala».  
Pardonu do «pretekstan mensogeton»;  
ĝin am' sugestis ĝis nun senpretenda  
por alparoli rajte cin, poeton,  
kun iluziodono ne ofenda...

Inspirosprona tia kis' okazis  
— mi senjaluze pensas — ĉiulande;  
vundite mem vunditan koron lasis  
la «migra bard'» revidon esperante..  
Mensogis mi, jes, tamen diris veron,  
ĉar ci la kison nur al koro donis,  
per kantoj nutris plu en mi esperon..  
la koran kison pense mi — redonis.

49-jara medicina fratulino dez. kor. kaj ekkoni fremdajn landojn. Bozena Chalupová, Dlouhá stezka 1, Jihlava, Ĉeĥoslovakujo.

Josef Lanar, Sokolská ul. 18, Praha II, Ĉeĥoslovakujo, serĉas korespondadon por interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn kun la tuta mondo, sed precipe kun via lando. Al ĉiu letero mi certe respondos.

Mi estas 24-jara laborantino en magazeno de bonodoraj parfumoj — havas edzon kaj filineton. Mi dez. kor. kun norvegaj geesperantistoj. Penka Milenova, str. Beron 17, Kazanlak, Bulgarujo.

21-jara instruistino deziras serioze korespondi kaj interŝanĝi belajn bildkartojn (fot.) F.ino Dagmar Rajská, Stromoradni 2, Breclav, Ĉeĥoslovakujo.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun norvegaj gesamideanoj. — Haim Mezon, P.O.B. 825, Jerusalem, Israelo.

pri la haring-kaptado en pli frua tempo kaj la vigla kaj gaj-atmosfera vivo kiun estigis en Haugesund tiu kaptado. La paroladinto estis dankata per forta aplaŭdo. — Dum la kunveno oni priparolis la distrikтан jarkunvenon okazontan pentekoste en bela Hogganvik kaj la Universalan Esp.-kongreson en Budapeŝto.

### Korespondu!

Letervespero kaj la unua Esperanto ekspozicio en urbo Panevezis organizota en majo 1966. Bonvolu skribi multnombre kaj sendi esperantajjn al Litova SSR, Panevezis, Kulturdomo, Esperanto. Antaŭe ni dankas kaj respondos al ĉiuj.

\*

S.ro Ladislao Stupiak, *Budapest XXI*, Gevozev, Kapitany utca 27, Hungarujo, 16-jara komencanto, dez. kor. — Kolektas gramofondiskojn kaj bildkartojn.

Mi dez. kor. kun ĉiuj landoj letere, bildkarte aŭ poŝtkarte pri tiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, gramofondiskojn, bildlibrojn, Esperantajn librojn kaj gazetojn. Mi estas hungara pedagogo. — Georgo Flender, *Békéscsaba 5*, Bessenyei u. 15, Hungarujo.

Juna hungarino deziras korespondi kun norvegaj gesamideanoj. Interesoj: filmo, libroj, teatro, muziko, ekskursoj. — Ella Fóti, Váci út. 6. I. 7, *Budapest XIII*, Hungarujo.

Miroslav Barton, 44-jara oficisto, Ĉeĥova ĉp. 1271, *Turnov II*, (okr. Semily), Ĉeĥoslovakio, dez. kor. pri turismo kaj fremdaj landoj. Kolektas ilustritajn poŝtkartojn.

### Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

*Turisma Servo*: Boks 942, Oslo.

Postgiro 100.32

### Esperantoforlaget A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31

Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo

Telefon: 20 20 83

### Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a, Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

### La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:

Johan Hammond Rosbach,

Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun

adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.

Telefono: 54 7 27

Ci min ne konas, nek adreson, nomon;  
mi venis — kreu — varte cin dorloti,  
sufermildige peli for fantomon,  
por ci per preĝo kun la Di' komploti.  
Mi iros for... ci min neniam trovos,  
mi tamen restos kun ci ĝis la fino;  
ĝis cia kor' amritme kanti povos  
ci, kara, nestos ĉe mi en animo... »

«Ci, amikino ĉe l' spegul' de fĵordo,  
nun antaŭ ci la bardo riverencas...  
En cia letero ĉiu vorto  
ĝislarne tuŝis min kaj rekompencas.  
Maljuna bard' ne havas plu elanon;  
la aĝo igas lin jam — kompromisi.  
Do donu cian vejnoretan manon,  
al mi permesu ĝin dankeme kisi.»

Julio Baghy

Nia granda poeto Julio Baghy antaŭ kelka tempo fariĝis 75-jara. Sed Baghy vivas kaj verkas — malgraŭ ĵusa grava malsano. La poeto sendis al Norvega Esperantisto sian plej novan poemon «Norda letero». Estas plezuro kaj honoro por ni publikigi ĝin — kaj ni tion faras frontpaĝe, kiel eta honoro reciproka.

### La gazetara servo de N.E.L. en 1965

En 1965 ni distribuis 9 bultenojn enhavantajn entute 21 informojn (kompare kun 10 bultenoj kaj 24 informoj en 1964). Nur du el la bultenoj povis aperi en ambaŭ oficialaj lingvoj, ĉar nia kunlaboranto pri la Nov-Norvega, Arnljot Kyllingstad, devis

Nordisk Esperantokongress i Oslo .....	23
Nytt internasjonalt bilforbund .....	18
Esperantokongress i Oslo .....	18
Esperantoliturgi i katolsk gudstjeneste ....	17
Esperanto foreslått til Nobels fredspris ....	13

Ni registris entute 390 aperigojn de informoj aŭ artikoloj rilatantaj al Esperanto, el kiuj 212 estis novaĵoj distribuitaj en niaj bultenoj kaj 178 venis el aliaj fontoj (en 1964: 253 kaj 188). Entute 106 gazetoj (en 1964: 91) aperigis novaĵojn aŭ artikolojn rilatantajn al Esperanto. Sekvantaj gazetoj havis 10 aperigojn aŭ pli:

Nordlands Framtid .....	30
Haugesunds Avis .....	15
Arbeiderbladet .....	13
Morgenposten .....	13
Ryfylke .....	12
Hamar Arbeiderblad .....	11

pro aliaj taskoj ripozigi siajn servojn al la gazetara servo por iom da tempo, en 1966 la Nov-Norvega eldono denove aperas kun lia kunlaborado. Pri arkivado de gazetaraj eltondaĵoj sin okupas s-ino Ruth Herlofson.

Meza nombro de aperigoj de informoj distribuitaj en niaj bultenoj estis 10 (en 1964: 10,5). Pli sukcesaj laŭ nombro de aperigoj estis:

Friheten .....	10
Haugesunds Dagblad .....	10
Nationen .....	10

El la kluboj nur 5 sukcesis aperigi raportojn pri siaj jarkunvenoj en la lokaj gazetoj. La internacia fervojista kongreso en Hamar kaj la Nordlanda kongreso en Oslo donis okazon al raportoj en pluraj gazetoj. La Universalan Kongreson en Tokio la prezidanto de NEL pritraktis en vojaĝ-artikolo en Aftenposten.

La kunlaborantoj de la gazetara servo ricevis jarraporton pri 1964

(daŭr. p. 60)

## Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,  
Hans Amund Rosbach

Adreso de la redakcio: Hulderveien  
17 B, Sarpsborg. — (Limdato por manuskriptoj: la 20. en la monato antaŭ la apero.

Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anoncprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—  
1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—  
1/8 p. kr. 19,—

## La lastaj semajnoj

Iom post iom la klubaj vivo ekdormas antaŭ la somero. Ĝardenoj, aŭtoj, boatoj aŭ arbaraj promenadoj postulas nian liberan tempon.

Tamen ni povas daŭre kolekti subskribojn. Eluzu la ŝancojn. Memoru, ke nur kelkaj semajnoj restas. Pensu, ke ĉiu nomo valoras, ĉiu momento povas esti la ĝusta por akiri tiun nomon.

Zorgu, ke la lastaj semajnoj estu la plej riĉa periodo en la rikoltado de subskriboj!

## Fino de la subskribado

La kolektado de subskriboj al la propono al U.N.O proksimiĝas al la fino. La lastaj folioj devas atingi la Centran Oficejon de U.E.A. antaŭ la 31a de Julio. Tio signifas ke la lastaj norvegaj folioj devas atingi la oficejon de N.E.L. antaŭ la fino de Junio, aŭ plej laste en la unuaj tagoj de Julio, ĉar ni devas unue fari statistikon pri ili, kaj poste transsendi ilin ĝustatempe al U.E.A.

Ni petas ĉiujn niajn fidelajn membrojn atenti pri tiu ĉi limtempo. Bon-

volu nepre sendi al ni ĝustatempe ĉiujn listojn, sur kiuj estas subskriboj, egale ĉu la listo estas plena aŭ portas nur kelkajn aŭ eĉ nur unu nomon. Kaj ni dankas al ĉiuj kunlaborintoj pro bone farita laboro.

La Liga Estraro.

## Sciigoj de N.E.L.

Aŭtuna kursagado. Nun estas la tempo, kiam la klubaj estraroj devas plani la Esperanto-kursojn aranĝotajn dum la venonta aŭtuno. Ĉiu klubestraro devas nun serioze pritrakti tiun demandon. Ne diru ke ne anoncos sin kursoj, sed faru konkretajn planojn pri intensa varbagado je la komenciĝo de la aŭtuna sezono. La jarraporto de N.E.L. (vidu la pasintan numeron) montras ke ankaŭ en 1965 daŭris la malkreska tendenco de la membro-nombro. *Urĝas haltigi tiun tendencan* kaj turni ĝin en kreskon. Spertoj jam montris ke per insistita klopodado kursoj estas ankaŭ nun starigeblaj. Senescepte ĉiuj kluboj kaj laŭeble multaj el la rektaj membroj devas starigi kursojn dum la venonta aŭtuno. Nur per kursaranĝoj oni povas kreskigi la membraron de la kluboj kaj fondi klubojn en novaj lokoj. N.E.L. estas preta helpi per kursmaterialo kaj konsiloj. Ŝtatan subvencion por la salajro al la kursgvidanto ni povas ricevi. Kie neniu loka samideano povas gvidi kurson, oni klopodu fondi studrondon por komencantoj per la koresponda kurso. Petu pri nia studplano. Krome oni klopodu igi lokan gazeton publikigi la gazetkurson (skribu al N.E.L. pri plano kaj provleci-

ono). Sed komencu *jam nun* prepari la aŭtunajn kursojn!

*Taskotabelo por la kluboj.* — *Junio:* La estraro planas la aŭtunan laboron kaj precipe decidas detalojn rilate la aŭtunajn kursojn.

*Julio:* Antaŭ la 15a la sekretario sendas al N.E.L. (kun kopio al la distrikto) raporton pri la 2a jarkvarono kun studraporto pri la 1-a jarduono dorsflanke (blankedo A 10/E 1).

*Aŭgusto:* Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato. La estraro zorgas pri kursejo kaj kurspropagandiloj.

*Septembro:* La kursoj komenciĝas. La studgvidanto refunkciigas la studrondojn kaj fondas novajn. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato.

*La Liga Estraro.*

## Monkolekto al la Informadfondajo de N.E.L.

*La 5-kronrulado — Listo 10:*

Jenaj donacis 5 kronojn:

Roald Birch Olsen, Greåker  
Ragnar Kjøngisen, Lande  
Ludv. Lindskog, Sarpsborg  
Joh. Hammond Rosbach, Sarpsborg  
Karsten Langsholt, Sarpsborg

Entute kr. 25,—.

*Aliaj donacoj:*

Stavanger Electro-Staalverk A/S,  
Jørpeland, kr. 200,—.  
Oslo Esperanto-Klubb (ellotumado)  
kr. 100,—.

Ni dankas kaj atendas pluajn donacojn kaj sugestojn pri donacemuloj de la aliaj kluboj.

*La Financa Komisiono de N.E.L.*

## La gazetara servo —

(daŭr. de p. 58)

kaj apartan cirkuleron en decembro. Cetere kontakto kun ili okazis per individua korespondado. La gvidanto de la gazetara servo ĉeestis la internacian fervojistan kongreson kaj la Nordlandan kongreson, en kiu li gvidis la fakkunvenon «Esperanto en la gazetaron».

La gvidanto de la gazetara servo dankas ĉiujn kunlaborantojn pro iliaj sindonaj kaj fervoraj klopodoj en 1965, dezirante al ili kiel eble grandan sukceson en 1966.

*Ludvig Anjer*

## Studenta Tutmonda Esperanta Ligo

aranĝos 10—17an de aŭgusto 1966 la 1-an STELO-Kongreson en RUSE, Bulgario. Adreso: Ruse Kosomolska 8 S.E.K., Danuba Studento, Bulgario.

### PROVIZORA PROGRAMO :


Interkona vespero, bulgara folklor-vespero, Internacia Balo, ekskurso al Tirnovo (pitoreska bulgara historia urbo), Venecia vespero kun la loka junularo sur la palubo de la unuaklasa ŝipo sur la Danubo, vizitoj de la urbo, vizitoj de la regionaj kooperativaj farmoj, ekspozicioj, laborkunsidejoj de la Komitato de STELO.

Post la Kongreso nun estas pri-traktata kun DEJ unusemajna restado en la luksa studenta somerrestadejo ĉe la Nigra Maro en Primorsko je la reduktitaj prezoj proksimaj al la Kongresa kotizo. La O.K. anoncos vin siatempe pri la afero. Restas ankoraŭ: Bonvenon en la Sunplena Bulgario.

### JUBILEO

La 30-an de majo Møre, Romsdal og Trøndelag krets estas 10-jara.

På  
norsk



*Esperanto slår røtter i Øst-Asia.*

Skjønt Esperanto trengte frem til Øst-Asia alt i begynnelsen av århundret, ser det ut til at utbredelsen av språket i landene i Østen først nå er kommet frem til den avgjørende utvikling. Dette gjelder land med vidt forskjellige politiske systemer.

I Sør-Korea er det dannet en ny organisasjon 'Korea Esperanto-Societo', som nettopp er tilsluttet verdensforbundet Universala Esperanto-Asocio. Samtidig har et statsforlag i Nord-Korea utgitt en 350 siders Esperanto-koreansk ordbok. — Det mongolske statsakademi har nylig utgitt en lærebok og en ordbok for mongoler.

Mens Peking fortsetter sine radio-programmer på Esperanto og brosjyrer på Esperanto til alle verdensdeler, annonserer Fremmedspråkforlaget i Hanoi 8 nye bøker på Esperanto. I Japan har verdenskongressen i Tokio siste høst gitt en sterk ansporing til å lære det internasjonale språket, særlig blant studenter og unge mennesker forøvrig.

*Esperanto i fjernsyn*

I Sao Paulo i Brasil ble det nylig sendt fjernsynskurs i Esperanto. Ett kurs gikk hver dag i to uker, og et annet — etter såkalt direkte metode — i fire dager. Utsendelsene foregikk i samarbeid med undervisningsdepartementet. Nå blir erfaringene sammenlignet og analysert, med tanke på fremtidige programmer.

## UNESCO-novajoj

*Itala vortaro por la jaro 2000.*

La respektinda «Accademia della Crusca», kiu jam en 1582 starigis al si la taskon kompili vortaron de la itala lingvo, «liberan de ĉiuj nepuraĵoj», decidis nun rekomenci ĉe la komenco.

La unua eldono de la vortaro aperis en 1612, la dua en 1623, la tria en 1691, komplete en tri volumoj. Por la kvara eldono — en ses volumoj — aperinta en 1738, necesis duona jarcento da preparado. La sesa eldono, post tuta jarcento da laboro, ankoraŭ en 1923 estis progresinta nur ĝis la litero O. La nunaj akademianoj atendas, ke la unua volumo de la nova vortaro aperos post dek jaroj, kaj la lasta ĉirkaŭ la jaro 2000.

*Okuloj per aerpoŝto al Hindujo, Pakistano, kaj Malajsio*

Britaj «okulbankoj» disponigos freŝajn korneojn por greft-operacioj al hospitaloj en Hindujo, Pakistano kaj Malajsio. Laŭ la konsento de IATA — la Internacia Aer-Transporta Asocio — la fluglinioj portos la okulojn senpage. Necesos utiligi la okulojn en la daŭro de kvin tagoj post la dato de livero al la Londona aerhaveno.

*Decimaligo de aŭstralia mono allogas ekspozicion de komercaj maŝinoj.*

Aŭstralio devos aĉeti novajn kasmaŝinojn kaj aliajn komercajn maŝinojn ĝis la valoro de ĉ. \$ 60 000 000, kiam ĝi adoptos decimalan monsystemon en januaro 1966. Tio jam instigis 19 skandinaviajn firmojn aranĝi surŝipan ekspozicion de komercaj maŝinoj, kiu vizitis kvin aŭstraliajn havenurbojn dum aprilo 1965.

Laŭ Unesco-Features kaj UEA-Informservo



## RECENZOJ

Leteroj el Ĉinio de Anna Louise Strong. Novmoda Eldonejo, Pekino. Broŝurita, 120-paĝa.

Jen 10 leteroj, kiujn skribis, multobligis — eĉ presigis la usonanino Anna Louise Strong, loĝanta en Ĉinio, kaj sendis al amikoj diverslandaj, kiuj poste tradukis kaj pluensendis. Tradukis franclingven «por uzo en Afriko», en hispanan por Latinameriko ktp.

En tiuj dek leteroj ŝi aŭtoritate preparolas ĉiujn politikajn problemojn, en kiuj Ĉinio partoprenas, i. a. la konflikton inter Ĉinio kaj Hindujo, Tibeto, Kubo ktp. Ŝi ĉiam povas montri al pruvoj pri la vero: ŝi citas el la plej granda ĉina gazeto. Kaj ŝi absolute neas la asertojn el aliaj landoj.

Ŝi ankaŭ iom preparolas sin mem. En 1921 ŝi veturis al Moskvo, loĝis tie dum 30 jaroj. Poste iris al Ĉinio. Tamen asertas pri si mem, ke ŝi estas usonanino!

Kaj en tio ni trovas la veran valoron de tiuj leteroj: Usonanino rakontas la veron pri komunismo! Oni tradukas kaj sendas al la pli primitivaj, politike neevoluintaj landoj. Kaj: ŝi ne estas iel naiva, senhelpa oldulino, sed sperta komunista ĵurnalista dum pli ol 40 jaroj! Ne strange, ke la komunista reĝimo de Ĉinio elsendas la esperantlingvan eldonon de tiuj ĉi leteroj de «usoanino». R.

Hispanio por Vi. 72-paĝa kajero.

Plej alloga, amuziga kaj lerniga turisma broŝuro, kiu ne logas vin al tiu aŭ jena loko, sed donas ĉiajn konsilojn pri via propra konduto ktp. dum via restado en Hispanujo, por ne — nevole — ĝeni la indiĝenojn per miskomprenoj de la etiketaj reguloj, aŭ mem esti ĝenata de ili. Vi lernas kompreni!

Bedaŭrinde la broŝuro ne indikas kie aŭ kiel havigi ĝin. Eble ĝi estas disdonata en Hispanujo en elekteblaj lingvaj formoj.

HAR

\*

Gustaf Lundberg: Kredo al Dio en la atomepoko. 46-paĝa kajero. Eldona Societo Esperanto, Malmö.

La aŭtoro estis profesoro ĉe la teĥnika altlernejo en Gotenburgo kaj verkis tiun ĉi broŝuron svedlingve. Tradukis ĝin al senmakula Esperanto Erik Carlén.

En tri artikoloj (aŭ ĉapitroj) li, la teĥnikisto, pritraktas la religiajn problemojn, kaj unue montras la sekvojn de tute senreligia vivo. Li, kompreneble, vidas tiom antaŭen, ke la homo ne plu vivas sur la kristana heredo — sed ni jam vidas la konturojn de tia konvinko.

«...la laboro iĝas ŝarĝo. Ĝia celo nur iĝas gajni la ekonomian fundamenton por vivadi. La laboro fariĝas tempo morta. Tiel ni iĝas sklavoj...»  
«...Ĉu vi povas permesi al vi rezigni erotikan travivaĵon? La vivo ja estas tiel mallonga. Peko? Forigu tiajn antaŭjuĝojn! Kinsey konstatas la pekon kaj malhonoron de la homoj per ekzaktaj ciferoj, kiuj indikas diverspecajn moralkrimojn. Kaj la reago estas triumfa: Jes, tion mi ja imagis! Tiaj estas la homoj! Nun la moralistoj ne venu! La scienco diris sian vorton...»

La konkludo do estas: Pura egoismo.

Sed: Ĉu la naturscienco kaj la kristanismo povas kune ekzisti? Jes, ne. Per monro al la sciencaj scioj pri la naturo de la lumo, li montras, ke oni neniam povas kapti la tutan realecon en kelkaj konceptoj. La lumo estas ondoj, sed la lumo ankaŭ estas materio. «Kaj tiuj du perceptoj en la mikroskopa mondo absolute kontraŭas unu la alian.» Tiel — la du teorioj pri lumo devas vivi unu apud

la alia, ili kontraŭas unu la alian, sed ambaŭ estas necesaj — tiel ankaŭ rilate ĉio en la mondo. Kaj tiel la plej evoluintaj sciencistoj akceptas religion kiel parto de la vivo, necesa — kvankam iurilate ĝi ŝajne kontraŭas la spertojn de la vivo sur aliaj flankoj.

HAR

\*

Martinus: Inter du mondepokoj. 108-paĝa, bind. Eldonis Martinus-instituto, Kopenhago 1965.

En tiu ĉi libro, kiu portas la numeron 9, Martinus i. a. diras «Analizi la situacion povas esti nur utile...» kaj «La antaŭe prezentitaj analizoj pri la rilato de la socio al la plej altaj idealoj de la kristanismo do ankaŭ en neniuj maniero, nek al pastroj, juristoj aŭ militistoj, estu ia riproĉo.»

Ni povas samopinii, ke analizo estas utila. Sed kiam tiu analizo komenciĝas — kiel ni jam al kutimiĝis en la libroj de Martinus — per kompleta misprezento de la kristanismo, oni ne tute komprenas la utilon. Nek oni komprenas, ke eldiroj kiaj «Kiel povas pastro plenumi la sakramentojn aŭ inspiri al rifuzo de uzado de glavo havante mortigilon sub la pastra robo?» povas esti riproĉo — ĝi povas esti simple nur mensogo kaj ofendo.

Tamen — Martinus verŝajne ne volas koni la kristanisman, sed nur la miskomprenitan kredon pri kristanismo. Kaj tiu miskompreno estas tiel populara, ofte renkontata, ke ni juĝu la intencojn de Martinus laŭ ĝi, ne laŭ kristanismo kia ĝi estas, sed laŭ la tro ofta opinio pri ĝi. Kaj tiam, kiam oni pluen legas en tiu libro, ĝi kaptas la intereson. Kaj mi kuraĝas diri, ke laŭ mia opinio ĝi estas la plej leginda el la ĝis nun elsenditaj.

Nur — mi ankoraŭfoje konsilas al Martinus, ke li, pretendante spiritan sciencon, ankaŭ serĉu la veron pri kristanismo, ne la onidirojn. Haro

## 40 jaroj Naturamika Esperanto-Fakgrupo

Ekzistas multaj fakgrupoj en la monda Esperantomovado, sed estas ankaŭ kelkaj Esperanto-fakgrupoj, kies bazaj organizoj ne estas esperantaj. Al tiuj maloftaj Esp.-fakgrupoj apartenas la «Turista Asocio la Naturamikoj» Esperantofako (TANEF.) ties sukcesoj estas unikaj en la ne esperantistaj internaciaj amasorganizoj. La granda naturamika internacia organizo nombras 365 mil membrojn kaj posedas 765 domojn kaj kabanojn en 16 landoj.

La fondkunveno okazis laŭ la iniciatinto s-ro Klein, nuntempe vivanta en Montevideo, la 2an de marto 1926. Kiel estro funkciis s-ro R. Cech, la nuna honorprezidanto de la Aŭstria Esperantista Federacio.

## Raporto pri la 5-a Paska Kultura Semajno en Grésillon

Oni studis esperantajn tekstojn, originalajn kaj tradukitajn, de Kalocsay, Schwartz, Grabowski, Edm. Privat. Ili ebligis al ni pligrandigi niajn gramatikajn konojn kaj apreci la muzikecon de la lingvo.

La prelegoj pritraktis la plej diversajn temojn:

- lingvistiko: «Ortografio kaj fonetiko» kaj ĉar vorto 'stas Vorto»,
- sciencoj: «Lasero»,
- celoj de esperanto: «Edukado kaj Toleremo» (interkompreniĝo de la popoloj),
- konatiĝo kun la mondo per Esp.o: ni admiris lumbildojn pri diversaj landoj: Japanujo, Skandinavio, Islando, Hungarujo, Groenlando,
- historio: «Informoj pri Keltoj».



## Mi opinias . .

Pensoj de la legantoj

### LA ENHAVO DE NORVEGA ESPERANTISTO

Nature estas multaj opinioj pri la plej interesa parto de nia organo. Tion ankaŭ montris la enketo pri tiu temo antaŭ nelonge. Mi persone trovas la organon bona kaj interesa, kaj unuvice ŝatas la raportojn pri la klubkunvenoj lernante per ili pri la kluba vivo aliloke.

Sed mi ŝatus havi ankaŭ jenajn novaĵojn kiuj nun preskaŭ mankas en Norvega Esperantisto, nome:

1) Statistikon pri artikoloj pri Esperanto en la norvega gazeto, kio estas multe pli ampleksa ol la unuopaj esperantistoj scias. Tiam statistikon havas ĉiutempe la Asocia Estraro, sed tio nepre interesas ĉiujn esperantistojn.

2) Novaĵojn pri la Esperanto-mondo ekster nia lando. Bedaŭrinde nur malmultaj abonas eksterlandajn Esp.ĵurnalojn kaj pro tio ili entute ne scias pri la multaj okazaĵoj en la Esp.movado, ekzemple pri lokaj venkoj de Esp., ekspozicioj, ĉefprelegoj, landaj kunvenoj, elektoj ktp.

*John Berggreen.*

### KIEL ARGUMENTI

Al la plej multaj esperantistoj okazas ke ili devas «defendi» sian lingvon de tempo al tempo. Kvankam tute klare kaj logike ŝajnas al ili havi unu komunan lingvon, egale malklare kaj mallogike tio ŝajnas al multaj aliaj homoj.

Diskutante la aferon pri unu internacia lingvo, la esperantisto bezonas havi pretaj multajn bonajn argumentojn por konvinki siajn kontraŭulojn. Ofte okazas ke nur post la diskutado oni ektrovas la plej bonajn pensojn. Sed tiam estas tro malfrue, la kontraŭulo jam malaperis, — ofte kiel venkanto!

Se ni volas esti taŭgaj ambasadoroj por Esperanto, necesas ke ni instruas al ni mem kiel plej efike eluzi la argumentojn favoraj al Esperanto. Mi ĵus legis pri la fama usona sciencisto kaj politikisto Benjamin Franklin. Iam diskutante kun amiko, Franklin spertis ke la amiko venkis en la diskuto, kvankam li tute ne havis la plej bonajn argumentojn. Tiujn Franklin mem posedis, sed li ne sukcesis prezenti ilin sufiĉe bone kaj rapide! Post tiu tago Franklin celkonscie kaj diligente laboris por eduki sin mem, por lerni bonan stilon, skribante grandajn taskojn kaj ankaŭ strofojn. La rezultoj de lia laboro estis bonegaj.

Ni ne povas atendi ke en ĉiu esperantisto kaŝas sin persono kiel Benjamin Franklin! Tamen ni povas ja provi imiti lin iomete! En niaj kluboj ni povas aranĝi diskutvesperojn, tiel ke la membroj ekhavas la taskon (jam en la antaŭa kunveno) «defendi» Esperanton. 2 aŭ 3 el ili povas ludi la rolojn kiel kontraŭuloj. Tia diskuto aktivigas la membrojn, devigas ilin pripensi la aferon hejme. Aŭskultante al la aliaj oni multe lernas, kaj poste mem posedas pli bonajn argumentojn kiam oni «defendas» Esperanton al vera kontraŭulo! Kaj tio absolute estas necesa. Neniame estis facile «defendi» Esperanton! Ankaŭ hodiaŭ ne. Tio signifas ke ĉiu samideano devas scii kiel eble plej multe pri Esperanto, kaj scipovi eluzi ĉion kion li scias!

*Elna Matland.*

## El la jarraporto 1965/66 de Norvega Esperanta Fervojista Asocio

*Pri la 17. I.F.E.F.-kongreso.*

La ĝis nun plej granda tasko kiun la asocio prenis sur sin estis la aranĝado de la 17-a I.F.E.F.-kongreso en Hamar 22.—28. majo 1965.

La kongreskomitato, kiu konsistis de Per Johan Krogstie, prezidanto; Per Engen, sekr.; Johan A. Kleven, kasisto, kaj kun Odd Kolbrek kaj Nils Hegre kiel helpantoj, kun granda sukceso solvis sian taskon.

La kongreso, kiu dank al la bela vetero dum la tuta tempo, ĉiumaniere estis plensukcesa, kaj ankaŭ la ekonomia rezultato estis bona.

La kongreskomitato ĉie renkontis nur simpatian kiu montriĝis en la formo de praktika helpo, kaj morale kaj ekonomia apogo, tiel de la Norvega Ŝtata Fervojo kaj de la fakaj organizaĵoj kiel de la lokaj institucioj kaj unuopuloj en Hamar kaj ĉirkaŭaĵo.

*La membronombro.*

1/1 1966 estis la membronombro de N.E.F.A. 60 personoj.

*La rilatoj al Norvega Ŝtata Fervojo kaj al la fakaj asocioj.*

La bonaj rilatoj kun Norvega Ŝtata Fervojo kaj kun la fakaj asocioj daŭris ankaŭ dum ĉi tiu periodo.

Estis asignata signifoplena apogo al la laboro de la asocio kaj de la Norvega Ŝtata Fervojo kaj de la Norvega Fervojista Asocio. Al la 17. I.F.E.F.-kongreso estis de la Norvega Ŝtata Fervojo, de la Norvega Fervojista Asocio kaj krome ankaŭ de la Norvega Lokomotivista Asocio donitaj speciala asigno.

Por la partoprenantoj de la kongreso estis helpe de la Norvega Ŝtata Fervojo eldonita instrukcia kaj bela gvidlibro pri Maihaugen, Lillehammer. — La gazet- kaj informkontoro de la Norvega Ŝtata Fervojo eldonis 2 broŝurojn en Esperanto, unu kvar-koloran pri Norvega Fervojmuzeo kaj unu konvenan por esperantistoj, la broŝuron: «Bona vojaĝo kun N.S.B.» Post kiam ambaŭ ĉi tiuj broŝuroj estis sufiĉe priskribitaj en esperantaj gazetoj kaj ĵurnaloj, alvenis multege



*La partoprenantoj en la jarkunveno de N.E.F.A.*



La nova estraro de N.E.F.A. En la unua vico, de maldekstre: Kjell Karlsen, Gunnar Flenvang, Per Johan Krogstie. En la dua vico: Erling Rygge, John Moe, Nils Hegre, Odd Kolbrek

da petoj de la tuta mondo pri alsendo de la broŝuroj.

Tre grava estas, ke la Norvega Fervoja Asocio kun pli ol 19000 anoj kolektive apogis la admonon al U.N. pri fortigado de la instruado en Esperanto kaj pri antaŭenigado de la aplikado de ĝi kiel oficiala lingvo, en ĉiuj internaciaj interrilatoj.

La kontakto kaj la kunlaboro kun Norvega Esperantista Ligo ankaŭ estis la plej bona.

En la gazeto de la Norvega Fervoja Asocio «Jernbanemanden» plurfoje aperis fakaj artikoloj kiuj estas tradukitaj de N.E.F.A.-anoj.

*Fakaj taskoj kaj streĉoj.*

N.E.F.A. estas de la fakparoladkomitato de I.F.E.F. admonita respondi pri tasko de secureca speco, kiamaniere estas farata kiam la konstantaj signalaparatoj ne funkcias. Al ĉi tiu tasko respondis trafikinspektoro Per Engen.

Plue estas de la faklibrokomitato de I.F.E.F. transdonita esperantlingva vortareto kun ĉ. 2000 diversaj fervoj-

fakesprimoj, bazita de la vortlibro de la fervojunoigo (la U.I.C. leksikono) kaj laŭ la kodonumerigo en ĝi. La laboro pri la tradukado de ĉi tiu materialo al naciaj lingvoj kaj pri la ordigo laŭvice Nacilingvo-Esperanto nun okazas en la plej multaj landoj. En Norvegujo, koncerne N.E.F.A., ĉi tiu laboro estas prizorgata de Fervojekspedisto Per Johan Krogstie kaj Trafikinspektoro Per Engen.

Peto al «Rutebok for Norge» kun admono ke la internaciaj signoj estu klarigotaj ankaŭ en Esperanto en la norvega horaro kiel nun estas farata en iom post iom pluraj landoj estis negative respondita.

*La kursaranĝado.*

Oslo Fervoja Esperanto Klubo aranĝis kune kun Klubo Esperantista en Oslo elementan kurson.

Kelkaj el la personaro en la vojaĝoficejo en Hamar starigis leterrondon pere de la leterkurso de «Folkets Brevskole», studgvidanto estas Fervojekspedisto Kåre Morønning, krome la leter-rondo ricevas valoran apogon

de la prezidanto de la loka esperanto-klubo de Hamar, s.ino Elise Koller.

En la membrogazeto de la asocio de la norvegaj fervojistaj abstinenculoj aperas nuntempe gazetkurso.

*La jarkunveno 1966.*

La jarkunveno por 1966 okazis dimanĉe 27/2 1966 en Kilde gastejo, Løten. Kiel kunvenigvidanto elektigis Kjell Karlsen. La prez. deziris al la alvenintaj, speciale al la sveda gasto, la prezidanto de la sveda sekcio de IFEF., Rune Palmgren el Stokholmo, koran bonvenon. Poste li en mallonga parolado memorigis la anon Lokomotivestro Magnus Tveit, Trondheimo, kiu mortis dum la periodo.

La protokolo kaj la kalkulraporto unuvoĉe aprobis.

Per Johan Krogstie reelektiĝis kiel prezidanto kaj John Moe kiel vicprezidanto. Kjell Karlsen elektiĝis kiel kasisto kaj Odd Kolbrek daŭrigas kiel sekretario. Jenaj elektiĝis kiel estraranoj: Nils Hegre, Brumunddal kaj Gunnar Flenvang, Oslo kun Erling Rygge, Oslo kaj Olaf Nyberg, Åndalsnes kiel 1. kaj 2. anstataŭantoj. Kiel revizoroj funkcios Gunnar Pedersen, Oslo kaj Johan A. Kleven, Hamar, kaj Gunnar Flenvang kaj John Moe elektiĝis kiel bibliotekistoj. Kiel fakdelegito al U.E.A.: John Moe. Komitato kiu konsistas el Per Engen, Kjell Karlsen kaj Per Johan Krogstie revizios la leĝaron de N.E.F.A.

Kiel delegitoj en la distriktoj elektigis jenaj:

Oslo distrikto:

Lokomotivhejtisto Sverre Hjelseng, Lok.stallen, Lodalen Oslo Ø.

Hamar distrikto:

Administranto Nils Hegre, Br.dal

Trondheim distrikto:

Provizservisto Erling P. Næss, Marienborg, Trondheim

Drammen distrikto:

Tornisto John Moe, Lok.stallen, Filipstad, Oslo V.

Kristiansand distrikto:

Pensiita staciestro Ragnvald Horrisland, Venesla

Stavanger distrikto:

Pensiita librotenisto Harald Houen, Egersundsgt. 4, Stavanger

Bergen distrikto:

Fadenkontrolisto Wilfred Hortman, Finse

Oni decidis ke la venontjara jarkunveno okazu en Oslo.

De la germana kaj de la dana I.F.E.F.sekcioj alvenis salutleteroj al la jarkunveno, krome ankaŭ de Norvega Esperantista Ligo. La prezidanto de la sveda IFEF.sekcio, Rune Palmgren, salutis nome de sia sekcio kaj dankis ĉar li ricevis okazon ĉe-esti la kunvenon.

Fine estis simpla regalo kaj agrabla kunestado.

### Hilda Dresen 70-jara

La 11-an de majo Hilda Dresen, konata poetino de la Esperanta literaturo, estis 70-jara.

## 22-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Pécs

(Hungario) 23/7—30/7 1966

Korespondadreso: PÉCS 1. pk. 114. Poŝtĉektkto.: MNB-OTP Pécs 635-803

KOTIZOJ:

Malpli ol 20 jaraj: . . . 23,— us. dol.  
20 jaraj kaj pli aĝaj. . 25,— us. dol.  
Ne-membroj de TEJO 27,— us. dol.





## 51-a Universala Kongreso de Esperanto BUDAPEST

30/7—6/8 1966

Sub la alta protektado de S.ro Ödön Kishazi  
vicprez. de la Hungara Popola Respubliko

### VIZO

Ni refoje atentigas ke ne plu necesas antaŭdeponi fiksitajn sumojn nek speciale invitleteroj por ricevi la hungaran vizon, sed *sufiĉas montri la kongresan kartonon*. La diverslandaj hungaraj ambasadoj estas pri tio oficiale informitaj.

### FERVOJAJ RABATO

Per cirkulero no. 106256/1966.1/8.D de la 16-a de marto 1966 la Ministerio pri Transportoj Hungara informis ĉiujn kompetentajn fervojajn instancojn en Eŭropo ke la partoprenantoj en la 51a Universala Kongreso rajtas ricevi rabaton de 50% je la normala prezo por la vojaĝbileto en la hungara teritorio. L.K.K. estas nun atendanta informojn pri sama favoro fare de aliaj ŝtataj fervojoj.

### ALIAJ RABATOJ

La partoprenantoj en la 51-a Universala Kongreso havos la eblecon uzi senpage — dum la kongresa periodo — ĉiujn publikajn transportilojn en Budapeŝto (tramoj, aŭtobusoj, subtera fervojo).

### POSTKONGRESO

Por doni la eblecon al la partoprenantoj de la 51-a U.K. trankvile ĝui viziton de Budapeŝto post la Oficiala Fermo de la Kongreso, L.K.K. aranĝis ke la forveturo al Szeged, por la Post-

kongreso, okazu la 7an de aŭg. en la mateno. La interesigantoj bonvolu tion konsideri mendante loĝejon en Budapeŝto.

### HOTELOJ

Ni informas ke ne plu estas la ebleco rezervi litojn en hotelo de Kategorio D. Ni samtempe atentigas ke mendoj por litoj en hoteloj de kat. A, B kaj C devas atingi la konstantan adreson de la Kongreso antaŭ la 25a de majo — vidu informojn pri tio en la Dua Bulteno.

### KOTIZALPAGO

Laŭ la Kongresa Regularo aliĝoj al U.K. estas akceptataj ĝis la 30a de junio. Personoj, kiuj, pro iu ajn kaŭzo, aliĝas post tiu dato, devas *senescepte* alpagi al la fiksitaj kotizo la sumon de 25,— ned.gld. aŭ egalvaloro, por kompensi la ekstrajn kostojn, kiujn prokrastita aliĝo kaŭzas.

### ALPAGO EKSKURSOJ

Ni atentigas, kiel menciite en la Dua Bulteno, ke mendante ekskursojn post la 25a de junio oni devas pagi 15% pli multe, kondiĉe ke estos ankoraŭ liberaj lokoj.

### STATISTIKO

(je 30/4 1966): Alĝ. 1, Arg. 2 Aŭstral. 3, Aŭstr. 42, Belg. 48, Braz. 2, Brit. 124, Bulg. 132, Ĉeĥ. 256, Danlando 52, Finnlando 46, Franc. 272, G.D.R. 206, F.G.R. 142, Grek. 6, Hisp. 12, Hongkongo 1, Hung. 405, Irlando 2, Isr. 7, Ital. 105, Jap. 34, Jug. 47, Kanado 2, Meks. 1, Monako 3, Ned. 126, Norv. 11, Nov-Zelando 4, Poll. 54, Ruman. 16, Sovet. 28, Sved. 118, Svis. 28, Turkujo 1, U.A.R. 1, Urugv. 1, Usono 44. Entute 2387 el 38 landoj (pasintjare 1430 el 44 landoj).

## Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

### JARKUNVENOJ

*Klubo Esperantista en Oslo.*

3/3. Elektoj: Prez. John Berggreen (reel.); vicprez.: Otto Prytz (reel.); sekr. korespondanta: Aslaug Refsing (reel.); sekr. raportanta: Harda Danielsen (reel.); kasisto: Kr. Mortensen (nova); estraranoj: Thor M. Carlsen (nova) kaj Brynhild Østmo (reel.)

Elektiĝis John Berggreen kiel studgvidanto kaj T. M. Carlsen kiel propagandestro. — Ankaŭ elektiĝis du anstataŭantoj: Tore Haug (nova) kaj Kirsten Ek (reel.); revizoroj, klubaj oficuloj kaj komisiitoj.

La kunvenprezidanto redonis la martelon al la klubaj prezidanto kiu dankis al C. Støp-Bowitz pro la bona kaj taŭga gvidado de la kunsido.

*La Norda Steo, Hamar.*

Jarkunveno okazis ĉe s.ino Koller 25/2. La prez. deziris bonvenon kaj petis la raportojn de la kasisto kaj sekretarioj. La elektoj estis la jenaj: Prez. Lise Koller, vicprez. J. A. Kleven, kas. Else Stang, sekr. Ragna Johannesen, membro E. K. Ruud.

*Grupo Esperantista de Trondheim*

Jarkunveno okazis 1/2. — La nova estraro estas: prez. Lars Kåre Hunnes, vicprez. Oddmund Rykkvin, sekr. Nils Utne, kasisto Kristian Fleischer, studgvidanto Else-Margrethe Müller.

Dum la jarkunveno oni diskutis, inter aliaj aferoj, eventualan kurson por komencantoj. Ni bezonas kursagadon por renovigado de la esperantistaro. Sed bedaŭrinde oni plurfoje spertis, ke tro malmultaj lernontoj anoncis sin. Oni tamen volas denove provi en tiu ĉi jaro.

Antaŭe ni kunvenadis en preskaŭ

ĉiam unu sama loko — salono de hotelo — sed en la nova jaro ni provis, por ŝpari monon, kunveni laŭsekeve en hejmoj de grupanoj, kiuj havas sufiĉe grandan ĉambron. Tiu aranĝo ŝajnas sukceso, ĉar la nombro da kunvenantoj kreskadis.

Ni menciuj la ĉefajn programpartojn dum la ĉi-jaraj kunvenoj: John Svardal parolis pri malnovaj kaj novaj stratnomoj de Trondheim (da kiuj ekzistas pli ol mil). — Sonja Jørgensen prezentis sonbendon registritan el radio: intervjuo kun s.ro Berggreen, prezidanto de la klubo en Oslo, pri Esperanto. Ĉar la intervjuo okazis meze de tago, malmultaj el ni tiam povis aŭskulti.

En alia kunveno ŝi montris lumbildojn pri vojaĝo al kaj en Japanujo okaze de la universala kongreso. Ŝi prezentis al ni japanajn homojn, arkitekturon kaj naturon en diversaj lokoj.

Dum tiu ĉi vintro ni ekzercis nian lingvoscion per pecopa tradukado de novelo verkita de Arnulf Øverland. La novelo enhavas multajn pli-malpli malfacilajn idiomaĵojn, kiuj ĉiam kaŭzas diskuton.

*Ascendo, Halden.*

havis sian jarkunvenon meze de marto ĉe ges.roj Fridén. 5 anoj ĉeestis. La antaŭa estraro estis reelektita.

Poste oni ludis interesan ludon kun ludpecoj kaj tabuloj, nomatan bestludo. Ĉiuj ricevas tabulon kun diversaj bestoj kun norvegaj nomoj. La gvidanto legas la bestojn per Esperantaj nomoj kaj la alia devas trovi la koncernan beston. Kiu unue plenis sian tabulon, gajnis. — Interesa metodo por ekzerci la bestonomojn.

*«Mara Vento», Haugesund.*

okazigis sian jarkunvenon komence de marto. Jar-raporto kaj jar-bilanco aprobiĝis. Estis dum la jaro relative

vigla agado. Pluraj membroj partoprenis la jarkunvenon de NEL kaj la Nordlandan Esp.kongreson en Oslo. Plue la klubo estis relative multnombro prezentata en la distrikta kunesto en Hogganvik. La prez. partoprenis la internacian fervojistan kongreson en Hamar. Funkciis studrondoj por komencantoj kaj daŭrigantoj.

Jen la rezulto de la elektoj: Prez. O. Thormodsen (reel.), vicprez. Klara Dahl (reel.), sekr. Johs. Sortland (reel.), kasisto Steffen Kjetland (nova), kaj O. J. Rønnevig, estrarano (nova). Anstataŭantoj: Solveig Mathiesen kaj Lovise Sortland. Revizoroj: Sigmund Blikshavn kaj E. Vorland. Studgvidanto: Ove Birkeland. Komitato de informado: S. Ege, Arne Gram, A. J. Smedsvik. Bibliotekisto: Sv. Loge Pettersen.

Dum la kunveno estis aŭdigata sonbenda intervjuo kiun faris la prez. kun la japana studento Hidejuki Sakueda. — Du klubanoj prezentis en bona maniero amuzan Esperanto-skeĉon. Vigla aplaŭdo al la agantoj.

Alia sukcesa programero estis la asociada ludo «stikkord» kiu estis interes-kapta kaj lerniga.

## ORDINARAJ KUNVENOJ

### *Klubo Esperantista en Oslo*

21/3. John Berggreen memorigis pri la subskribkampanjo. — Kirsten Ek prezentis tre riĉenhavan numeron de la klubga gazeto «La Vagabondo». J. Berggreen prizorgis la 10-minutan lingvan instruadon. La temo estis la melodio de la esperantaj vortoj kompare kun la norvegaj.

14/4. Koran bonvenon deziris la prez. John Berggreen. Li ĝojis vidi inter niaj gastoj ankaŭ eksterlandajn — el Hungarujo kaj Usono. Ĉi tiu kunveno estis aranĝita kiel «Hungara Vespero» okaze de la venonta U.K. en Budapeŝto.

Kirsten Ek, kiu gvidas la Turisman Servon, klarigis pri la kongresaj aranĝoj — antaŭ- kaj postkongresoj, ekskursoj, junulara kongreso, infankongreseto ktp. Ŝi planas komunan vojaĝon al la Kongreso: ŝipe al Kiel kaj poste aŭtobuse kun vizitoj interalie en Salzburg kaj Wien. La prez. kaj detalojn por la vojaĝo (3 semajnoj) ŝi esperas havi baldaŭ.

Akompanita per tirharmoniko de Karl Balla kaj per piano de Asbjørn Syslak ni komune kantis «La Klubo» n. La du muzikistoj ankaŭ ludis hungaran muzikon. — Anstataŭ la kutimaj kafo kaj kukoj la ĉeestantoj hodiaŭ ricevis hungaran pladon (kokinviandon kun rizo) kaj hungaran vinon. Kirsten Ek preparis la manĝaĵon, kaj klubaninoj en kostumoj servis ĝin. La tabloj estis ornamitaj per flavaj narcisoj.

18/4. La prez. John Berggreen kaj C. Støp-Bowitz donis kelkajn informojn. — Hodiaŭ la 10-minutan lingvan instruadon prizorgis R. Bugge-Paulsen, kiu tre lerte kaj funde klarigis pri transitivaj k. intransitivaj verboj. Otto Prytz gvidis la divenkonkurson en formo de kruzvortenigmo.

### *La Esperantoklubo de Bergen*

aranĝis Hungaran Vesperon 24/2. Kjell Offerdal faris topografian kaj historian enkondukon, kaj menciis ke niaj scioj pri mezeŭropa kulturo estas ege limigitaj. — Johs. Jahren montris amason da lumbildoj pri Hungario, kiujn Jenny Jahren komentariis. — Åshild Birkenes kaj Doris Birkelund legis epitomojn el hungara antologio, kaj donis al ni enkondukon en literaturon, kiu estas malmulte konata en Norvegujo. — La virinoj de la klubo komponis hungaran menuon, kiu estis bongusta, kaj ĉardasritma hungara kanto kontribuis al altiĝo de la etoso de la vespero.

24/3. Kjell Offerdal prelegis pri Rudyard Kipling, kaj kelkaj de liaj plej konataj kaj famaj poemoj estis legataj de Agnes Hennemann kaj Offerdal. — Åshild Birkenes prelegis pri «La Ĉielarko». Ŝi rakontis pri la legenda diino Iris, kaj citis Tibor Sekelj kaj André Bjerke. — La prez. finis la kunvenon kaj instigis la membrojn ĝui kaj studi la printempan naturon.

### *Sauda Esperantoklubb*

kunvenis 11/3 en Sparebanksalen. Por la kunveno la estraro per speciala letero invitis estintajn membrojn de la klubo. Kelkaj el ili alvenis, kaj la klubo ekhavis 4 novajn membrojn! La prez. Johan Matland diris bonvenajn vortojn, kaj la sekr. Elna Matland prezentis aktualajn novaĵojn pri la Esp.o-movado ĉirkaŭe en la mondo.

Malnova membro, inicianto de la movado en Sauda, lernejestro Emil Håland, rakontis pri la unua tempo de Esperanto en nia loko. — La programo daŭrigis per lingva demonstraĵo sur flanelografo per la prezidanto. Li ankaŭ informis pri la venonta kunveno, kiun ni dediĉos al la kongreso kaj Hungarujo.

19/4 estis aranĝita hungaran vesperon, dediĉita al la kongreslando. La aranĝo plene sukcesis. La prez. Johan Matland malfermis, dezirante bonvenon per aprila poemo. — S.ino Elna Matland faris prelegon pri Hungarujo, aldone al geografiaj kaj historiaj faktoj, ŝi vivigis la bildon de la lando per kartoj kaj bildmapoj. Poste sekvis belega hungara kolorfilmo kun la titolo Hungara Rapsodio, akompanata de la fama muziko de Franz Liszt.

Post ĉi tiuj gravaj programpunktoj venis la pli malsolena parto: ni altabliĝis al bela tablo, por ĝui hungaran gulaŝon kun ruĝa hungara vino. Kafo kaj kukoj ankaŭ bonege gustis. Normann Birkeli ludis violon-muzik-

on, Reidun Birkeli deklamis esperantan poemon, kaj Robert Dyhre la poemon «Republikanerne» en modela Esperanto.

Fine la prez. informis pri la kongreso kaj la vojaĝo tien, ŝajnis ke la membroj ekhavis grandan intereson por Hungarujo kaj la venonta kongreso. — Preskaŭ ĉiuj membroj ĉeestis la kunvenon, krom tio ankaŭ kelkaj novaj interesitoj, ĉiuj ekhavis inviton per speciala invitilo kun la prez. elsendis.

### *La Norda Stelo, Hamar,*

*Festkunveno* okazis en Avholdslokalet 2/2. — Ĉeestis membroj de la Esp.klubo en Løten kaj ankaŭ lernintoj de kurso kiun gvidis s.ino Koller pasintjare. — Vizitis nian klubon la ĉarma japana studento, s.ro Sakueda kiu faris paroladon pri sia hejmlando kaj per belegaj kolorlumbildoj montris al ni «Japanujo — la lando kaj popolo».

Kunveno okazis 16/3 ĉe s.ro Kleven. Venis diversaj cirkuleroj de NEL, inter alie amono daŭrigi la kolektadon de subskriboj al FN. Cetere oni tradukis artikolojn de Norv. Esperantisto kaj diskutis diversajn klubaferojn.

29/3 la Nordstelanoj estis invititaj al La Tri Verdaj Steloj en Løten. — Dezirante bonvenon la prez. esprimis la deziron ke oni daŭrigu la kontakton inter la kluboj en Løten k. Hamar.

De germana samideano kiu partoprenis la IFEF-kongreson en Hamar pasintjare, s.ro Krogstie ricevis serion da belegaj kolorlumbildoj faritaj dum la kongreso. Estis tre interese kaj amuze revidi la konatajn lokojn, la ekskursojn kaj la partoprenintojn.

### *Mara Vento, Haugesund,*

kunvenis 14/4. — Programulo estis lernejestro Anders Velde, kiu tre vivoplene, kolore kaj instrue rakontis



49-jara medicina fratulino dez. kor. kaj ekkoni fremdajn landojn. Bozena Chalupová, Dlouhá stezka 1, Jihlava, Ĉeĥoslovakujo.

Josef Lanar, Sokolská ul. 18, Praha II, Ĉeĥoslovakujo, serĉas korespondadon por interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn kun la tuta mondo, sed precipe kun via lando. Al ĉiu letero mi certe respondos.

Mi estas 24-jara laborantino en magazeno de bonodoraj parfumoj — havas edzon kaj filineton. Mi dez. kor. kun norvegaj geesperantistoj. Penka Milenova, str. Beron 17, Kazanlak, Bulgarujo.

21-jara instruistino deziras serioze korespondi kaj interŝanĝi belajn bildkartojn (fot.) F.ino Dagmar Rajská, Stromoradni 2, Breclav, Ĉeĥoslovak.

Mi deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun norvegaj gesamideanoj. — Haim Mezon, P.O.B. 825, Jerusalem, Israelo.

**Norsk Esperanto-Forbund**  
(Norvega Esperantista Ligo)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30  
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo  
Telefon: 20 20 83  
Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

**Turisma Servo:** Boks 942, Oslo.  
Postgiro 100.32

**Esperantoforlaget A/S**  
(Eldonejo Esperanto A/S)

Postadresse: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31  
Kontoradresse: St. Olavsgate 27 III, Oslo  
Telefon: 20 20 83

**Ĉefdelegito de U.E.A.:**

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,  
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

**La redakcio:**

Privata adreso de la ĉefredaktoro:  
Johan Hammond Rosbach,  
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun  
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.  
Telefono: 54 7 27

pri la haring-kaptado en pli frua tempo kaj la vigla kaj gaj-atmosfera vivo kiun estigis en Haugesund tiu kaptado. La paroladinto estis dankata per forta aplaŭdo. — Dum la kunveno oni priparolis la distrikta jarkunvenon okazontan pentekoste en bela Hogganvik kaj la Universalan Esp.-kongreson en Budapeŝto.

**Korespondu!**

Letervespero kaj la unua Esperanto ekspozicio en urbo Panevezis organizota en majo 1966. Bonvolu skribi multnombre kaj sendi esperantaĵojn al Litova SSR, Panevezis, Kulturdomo, Esperanto. Antaŭe ni dankas kaj respondos al ĉiuj.

\*

S-ro Ladislao Stupiak, Budapest XXI, Gevozev, Kapitany utca 27, Hungarujo, 16-jara komencanto, dez. kor. — Kolektas gramofondiskojn kaj bildkartojn.

Mi dez. kor. kun ĉiuj landoj letere, bildkarte aŭ poŝtkarte pri tiuj temoj kaj interŝanĝi bildkartojn, poŝtmarkojn, gramofondiskojn, bildlibrojn, Esperantajn librojn kaj gazetojn. Mi estas hungara pedagogo. — Georgo Flender, Békéscsaba 5, Bessenyei u. 15, Hungarujo.

Juna hungarino deziras korespondi kun norvegaj gesamideanoj. Interesoj: filmo, libroj, teatro, muziko, ekskursoj. — Ella Fóti, Váci út. 6. I. 7, Budapest XIII, Hungarujo.

Miroslav Barton, 44-jara oficisto, Ĉechova ĉp. 1271, Turnov II, (okr. Semily), Ĉeĥoslovakio, dez. kor. pri turismo kaj fremdaj landoj. Kolektas ilustritajn poŝtkartojn.



**Norvega Esperantisto**

ESPERANTOBLADET

N-ro 5/6  
1966

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO  
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo  
32-a (37-a) jaro  
Monata

Julio Baghy:

**NORDA LETERO**

Letero venis de la morna nordo. .  
La vortoj en tropika sento ardas:  
«Poet', mi sidas en silent' ĉe fjordo,  
en la spegul' golfeta min rigardas. .  
Pri suda kiso, jam en tomb' jardeka,  
memoro trudas sin al sol' intima,  
pri kis' printempa, min por Vivo veka,  
liganta al dorlota sent' anima. .

Ci, vagabondo kun sudkora flirto,  
promesis tiam foje min viziti;  
min ravis ritma tril' de l' suda birdo  
kaj mia koro emis tuj — krediti. .  
Esperis mi, sed vane, ĉar tra l' mondo  
tajfun' detrua de l' Malam' frenezis,  
en sango dronis plano pri renkonto;  
mem nia amo tiam nur — herezis. .

Sunora blondo mia jam griziĝis,  
okuloj kun ĉielo ne vetbluas,  
manetoj blankaj — vejnaj manoj iĝis,  
ne tintas mia rid', nur knare bruas. .  
kaj ankaŭ ci, tre kara vagabondo,  
tra l' okulvitroj nun la belon gvatas,  
vidante geamantojn en la rondo  
por l' kis' envie certe cin kompatas. .

Aĥ, min mi turnas for de l' golfa bildo  
por rejuniĝi nun, jardekojn peli,  
revidi nin en idilia mildo,  
pri dolĉa ŝanco pense refabeli  
kaj vivi, jes, revivi kio estis  
donace de la Viv' al ni donita,  
kion du koroj, ho, triumfe festis  
kun gajo en sindona senhezita. .

Poet', pardonu! . . . Tro mi arlekenis  
por distri cin ĉe lito hospitala. . .  
Kiam la fam' pri cia stato venis,  
kreiĝis pens' pri tiu «kis' fatala».  
Pardonu do «pretekstan mensogeton»;  
ĝin am' sugestis ĝis nun senpretenda  
por alparoli rajte cin, poeton,  
kun iluziodono ne ofenda. . .

Inspirosprona tia kis' okazis  
— mi senĵaluze pensas — ĉiulande;  
vundite mem vunditan koron lasis  
la «migra bard'» revidon esperante. .  
Mensogis mi, jes, tamen diris veron,  
ĉar ci la kison nur al koro donis,  
per kantoj nutris plu en mi esperon. .  
la koran kison pense mi — redonis.